**La babiladaj rondoj** okazos vendrede je la 19h30. La invitanto pagas al la societo la prezon de la luado de la salono *ESPACE DICKENS*. La gastiganto preparas mem simplan manĝaĵon (manĝon kaj deserton). La invitatoj alportas **nur** trinkaĵojn kaj aperitivojn. Je la fino ĉiuj donacas monon al la gastiganto (parte por manĝaĵo kaj parte por la salono).

**"Ambaŭ": la 1-an de aprilo ĉe Andrée de Keuster**
ch. des Murets 8, La Tour-de-Peilz, tél. 021 944 43 87

**"Orienta"**
**la 18-an de marto**
ĉe Charlotte Blanc Maillard
Avenue Nestlé 7, Vevey
021 922 34 74 * 079 393 32 63

Aliĝu ĉe:
http://doodle.com/poll/rwvef6hykb5dqds6

**"Okcidenta"**
**la 22-an de aprilo**
ĉe Monique Golaz
Ecole-de-Commerce 3, Lausanne
021 646 42 78 * 079 754 21 60 75

Aliĝu ĉe:
http://doodle.com/poll/8dk45bkb8brdf2nd

**"Ambaŭ": la 6-an de majo** (morgaŭan tagon de la Ĉieliro)
**Rosario** invitos nin en salono *Espace Dickens* (079 264 41 08).


## Laŭzana Esperanto – Societo

*Poŝtfako – Case postale 246 * CH – 1000 LAUSANNE 22*
+41 76 411 14 55 * +41 21 647 29 28 * sekretario@eo-l.ch
www.facebook.com/societedesperanto.lausanne
*Poŝtĉekkonto – CCP 10-26785-8*
Prez.: David Buhlmann * 021 624 36 38 – Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin * 076 411 14 55 – Kasisto : Françoise Pétermann * 079 517 44 43
Redaktoro de la informilo : Knud Sunier * 021 961 38 56


**Laŭzana Esperanto-Societo**

# Informilo

aprilo 2016 – n° 4

**Lunde, la 4-an de aprilo je la 20-a**
Monata kunsido ĉe Espace Dickens (Dickens 6), Laŭzano


## Karlota prezentos al ni librojn facile legeblajn

***Venu elekti iun por pli bonigi vian esperanton.***

**Lunde, la 2-an de majo**
*Prelego de David Buhlmann*

**Sabate, la 11-an de junio**
Jara ekskurso : surpriza vojaĝcelo !


***Somera paŭzo***



**Lunde, la 5-an de septembro**
*Decidota*

**Proverbo**

Aliloka ĉielo estas sama ĉielo.
*L.L. Zamenhof*



**Citaĵo**

Kredu en tiuj, kiuj serĉas la veron ; dubu pri tiuj, kiuj trovis ĝin.
*André Gide*

# Novaĵoj

La jara **Ĝenerala Asembleo de la Svisa Esperanto-**Societo okazos la **28-an de majo je la 14-a,** ĉe la restoracio Hulftegg (kantono St-Gallen). Vidu :
http://www.svisa-esperanto-societo.ch/kalendaro/
Tiuj kiuj deziras partopreni povas kontakti Charlotte Blanc Maillard (021 922 34 74 * 079 393 32 63 * kionova@bluewin.ch) por organizi la vojaĝon.

# Tridek grajnoj



Nokte sur la malsekajn arbojn falis neĝo, kaj poste la neĝo frostiĝis kaj forte gluiĝis al la branĉoj.
Alflugis parueto.
Mi malfermis la ventolukon, apogis liniilon sur ambaŭ traboj de la framo kaj lokis je ĉiu centimetro kanabajn grajnojn. La unua grajno troviĝis ekstere, eĉ en la ĝardeno, la trideka estis en mia ĉambro.
La parueto ĉion vidis, sed longe ne volis flugi al la fenestro. Fine ĝi kaptis la unuan kanaberon kaj forportis ĝin, sur sian branĉon.
Nenio malbona okazis.
Tiam la parueto prenis la duan grajneton.
Mi sidis ĉe la tablo, laboris, kaj de tempo al tempo rigardis al la parueto. Ĝi proksimiĝis laŭ la liniilo, centimetron post centimetro. Ĝi kvazaŭ demandis :
*- Ĉu mi povas forbeki ankoraŭ unu grajneton ?*
Poste ĝi forflugis, kun ankoraŭ unu kanabero, sur la arbon.
Jen restis la lasta grajneto. Ĝi kuŝis sur la ekstrema pinto de la liniilo. Iri al ĝi estis timveke !
La parueto tamen kaŝalvenis al la ekstremo kaj aperis en mia ĉambro. Scivoleme ĝi enrigardis la nekonatan mondon. Precipe ĝi miris pro la freŝaj floroj kaj tute somera varmo.
*- Ĉu vi logas ĉi tie ?*
- Jes.
*- Kial ĉi tie ne estas neĝo ?*
Anstataŭ respondo, mi turnis ŝaltilon. - Sub la plafono ekheliĝis luma globo.
- *Suno !* - miregis la parueto. - *Kaj kio estas ĉi tio ?*
- Libroj.
*- Kio estas libroj?*
Estis malfacile klarigi ĉi tion, sed mi diris :
- Ĉu vi vidas la bibliotekon, mian skribotablon, miajn aĵojn...
La parueto timeme ĉirkaurigardis.
- Ne timu. Mi nenion faros. Tiuj aĵoj estas por nia uzado, ni homoj.
*- Ĉu mi povas manĝi la lastan grajneton ?*
- Jes, certe ! Kaj mi deziras, ke vi flugu al mi ĉiutage. Vi vizitos min, kiam mi laboros. Ĉu vi konsentas ?
*- Bone. Sed kia estas "labori" ?*
- Nu, vidu, ĝi estas tia devo de ĉiu homo, sen kiu ne eblas vivi. Ĉiuj homoj devas ion fari. Per tio ili helpas unu al la alia.
*- Do, kiel vi helpas al homoj ?*
- Mi volas verki libron, por ke ĉiu, kiu legos ĝin, metu sur sian fenestron po tridek kanabajn grajnetojn.

Larisa Kunzmento
En Literatura Foiro, no 140, dec. 1992

*Paruo : mésange / Kanabo : chanvre*